

Nova eldono de DVD-Romo „Esperanto elektronike“!!!

Enkonduke

Post 5 jaroj ekde la unua eldono E@I nun planas la 3-an re-eldonon de la populara disko „Esperanto elektronike“. De la unuaj 2 eldonoj forvendiĝis entute 12.000 pecoj. Nun ni lanĉas novan antaŭmendan kampanjon, por kolekti sufiĉe da mendoj, por reeldoni la diskon.

Kia estos prezo?

Bonega! :) Disko kontraŭ 0,90 EUR? Jes, ĉe ni eblas!

1 EUR/peco – ĉe mendo ekde 50-499 pecoj.

0,90 EUR/peco – ĉe mendo de pli ol 500 pecoj.

La prezo povas esti tiom malalta pro amasa produktado – por tio ni bezonas atingi kvanton de 5000 diskoj – kio espereble ĝis somero realigeblas – ni tamen jam havas mendojn por 3000. Se do ankaŭ vi volas havi diskojn kontraŭ bona prezo, antaŭmendu ilin kaj helpu tiel atingi la bezonatan kvanton! Antaŭmendi eblas ĝis la fino de junio.

Rim.: E@I ne okupiĝos pri popeca vendado. Por tio bv. kontakti diversajn libroservojn. Minimuma mendo-kvanto estas 50 diskoj.

Kio estos nova?

Unue – prezo! :) (vidu detalojn supre).

Due – kovrilo. La disko estos ĉi-foje en papera/kartona kovrilo, kiu okupas malmulte da spaco kaj estas pli malpeza kaj pli ekologia. Tia kovrilo ebligas ankaŭ ŝpari sendokostojn – ĉar la diskoj estos malpezaj kaj tiel eblos sendi pli da ili kontraŭ malpli alta sendokosto.

Trie - enhavo: ĝi estos eĉ pli riĉa kaj bunta. Al la ĝisnuna enhavo (5,6GB) aldoniĝos multo nova:

- novaj gazetoj (pluraj jarkolektoj de la revuoj Esperanto, Kontakto, TEJO Tutmonde, Informilo por Interlingvistoj)
- novaj libroj (eldonaĵoj de UEA, Espero kaj pluraj aliaj)
- nova muziko (kunlabore kun Vinilkosmo kaj pluraj artistoj)
- novaj filmetoj (filmetoj „Esperanto estas...“, videoklipoj ktp.)
- nova submenuo – **Informiloj** por disponigi buntajn materialojn - afiŝoj, faldfolioj ktp.
- novaj lingvoj (kies lingvo mankas kaj pretas traduki, kontaktu nin :)

Do entute temos pri **pli ol 7GB da materialo** pri kaj/aŭ en Esperanto!

Kiam ĝi pretos?

Meze de julio 2011 – por povi distribui la diskon dum UK en Kopenhago kaj poste dum aliaj someraj E-aranĝoj (SES, FESTO, IJS ktp.)

Kie ĝi haveblas?

Distribuado okazos aŭ dum la diversaj someraj E-aranĝoj (UK, SES, IJS, ktp.), aŭ poŝte. Avantaĝo de la nova eldono estas ĝia malgrando kaj malpezo – tiel oni atingas malaltan sendokoston, eĉ por grandaj kvantoj.

En kiuj lingvoj?

La ĝisnuna versio enhavas 26 lingvojn. Por la nova ni esperas pri pliriĉigo – tamen la multlingveco de la disko estas ankaŭ en viaj manoj – ni volonte aperigos/aldonos novajn lingvojn, sed ni ne povas traduki la enhavon. Se vi interesiĝas kaj pretas volontule traduki la bezonatajn tekstojn (ne estas multaj) al via lingvo, bv. kontakti nin ĉe: dvd@ikso.net

Kiu kunlaboris?

Pri la disko fakte kunlaboris pli ol 100 personoj (ni listigas ilin en la disko mem). Nome de organizoj estas ĉefaj helpantoj/kunlaborantoj: E@I, UEA, TEJO, Vinilkosmo, STEB, BEMI,

Kia estas la enhavo?

Riĉa, bunta, valora, unika, kvalita, Esperanta :)

Kiel ĝi uzeblas?

Vi povas utiligi la diskon diversmaniere:

- disdoni ĝin (al via konatoj, amikoj, familianoj, klubanoj, membroj ktp.)
- vendi ĝin (en libroservo, al interesiĝantoj, dum ekspozicioj ktp.)
- pere de ĝi prezenti Esperanton (kaj ĝian buntecon) dum prelegoj, ekspozicioj ktp.
- donaci ĝin (por konkursoj, dum ekspozicioj, al plej fervoraj lernantoj ktp. :)
- meti ĝin al kongresaj sakoj (dum via E-renkontiĝo, kongreso ktp.)

La bona prezo ebligas vere amasan utiligon de la disko.

Kiel mendi ĝin?

Facile :) Sufiĉas kontakti nin ĉe: dvd@ikso.net (ĉefa respondeculo: Peter Baláž) kaj mendi deziratan kvanton. (Bone legu parton pri la prezo de disko)

La aktualan liston de mendoj ni aperigos en la paĝaro de la disko: <http://dvd.ikso.net>

Jen detaloj por antaŭmendi la 3-an eldonon de la disko Esperanto elektronike:

Ĝis kiam: Antaŭmenda periodo daŭros ĝis la 2-a de julio, por povi liveri la diskojn al UK en Kopenhago, kie ili aperos la 23an de julio (eblos liveri ankaŭ al [SES](#) kaze de deziro, same senpage).

Atentu! - por presi kovrilojn de la diskoj ni bezonos scii pri lingvoj, kiujn oni presu - jam ĝis la 25-a de junio! Do kaze de bezono de propra lingvo sur DVD-kovrilo, bv. mendi (aŭ almenaŭ mencii la mendon baldaŭan) la diskojn kun vialingva kovrilo ĝistiu tempo!!! Apartajn lingvo-versiojn eblas presi ekde mendo de pli ol 500 pecoj. (Oficiale estos presita dulingva - EO-EN versio de la kovrilo.)

Antaŭpago: Mendoj validos nur post la ricevo de antaŭpago (=duono de la sumo de menditaj diskoj), kiu devas veni ĝis la 2a de julio al nia konto.

Prezo: Nur 1 EUR ĉe mendo ekde 50 pecoj, nur 0,90 EUR/peco ĉe mendo ekde 500 pecoj!

Sendokostoj: La livero de diskoj al UK en Danio estos senpage, sen kromaj pagoj por liverado/sendokostoj (samo validas por livero al SES). Kaze ke vi mendos kaj volos liveron al alia loko (t.e. sendi poŝte), tiam necesos alkalkuli la sendokostojn.

Pagoj: eblas pagi aŭ al nia UEA-konto "ecxi-v" aŭ per **Paypal** al nia konto: financoj@ikso.net aŭ al nia konto en **banko en Slovakio**. (Eblas finpagi diskojn ankaŭ dum UK aŭ SES persone, kontante.)

Banko-datumoj:

kontonumero: 8887398/5200

nomo de la konto: EAI

IBAN: SK7552000000000008 887398

BIC/SWIFT kodo: **OTPVSKBX**

adreso de la banko:

OTP Banka Slovensko, a.s.

Pobočka, Nám. SNP 212/4

SK-958 01 Partizánske

Slovakio

Kiel ĝi aspektos?

Jen, vidu aldonitajn bildojn de la kovrilo. Ekzistos 2 eblaj/elekteblaj versioj: 1-lingva aŭ 2-lingva. La lingvon aŭ version de la kovrilo eblas libere elekti – ĉe mendo de pli ol 500 pecoj. Se vi deziras malpli da diskoj, tiam ni proponas version dulingvan – EO-EN (esperanto-angla). Tiu taŭgas bone por kaj E-istoj, kaj por informado al ekstera publiko.

Verŝajne kelkaj asocioj (de pli „fortaj, grandaj lingvoj“) mendos „siajn“ lingvo-versiojn. En tia kazo ni sekve povos al vi disponigi la diskojn en la sama lingvo. (Pri detaloj demandu nin rete, ni ankaŭ aperigos informojn pri kovriloj ene de la hejmpaĝo de la projekto en sekcio „Menditaj“)

La kovrilo per prilaboro similos al tiu de la pola disko „Esperanto“, farita de [E@I](#) por Bjalistoko.

La DVD mem aspektos same kiel antaŭa versio, kun nura mencio pri la 3-e eldono.

Dulingva kovrilo de la disko:

Esperanto Elektronike

MULTLINGVA ELDONO

III



MULTILINGUAL PUBLICATION



www.ikso.net

Electronic Esperanto

Sur tiu ĉi DVD troviĝas:

kantoj ■ ludoj en Esperanto ■ vortaroj ■ kursoj de Esperanto - multlingvaj (24 lingvoj), multnivelaj ■ filmo pri Esperanto, koncert-eroj, video-kurso Esperanta ■ informiloj pri Esperanto ■ instruiloj por Esperanto ■ fotoj de Esperantaj aranĝoj ■ revuoj en Esperanto ■ libroj en Esperanto ■ artikoloj pri Esperanto (el Vikipedio) ■ artikoloj en Esperanto (el Vikipedio) ■ faka literaturo pri Esperanto ■ faka literaturo en Esperanto ■ projekto „Pasporta Servo“ ■ Interesaj Interretaj ligiloj ■ programoj komputilaj en Esperanto



DVD Menu



Music: Paša Mojajev



Games: Battle for Wesnoth

On this DVD:

music ■ games in Esperanto ■ computer programs in Esperanto ■ a film about Esperanto, concert clips, an Esperanto course on video ■ Esperanto courses - in many languages and at many levels ■ information sheets about Esperanto ■ teaching materials for Esperanto ■ Esperanto event photos ■ magazines in Esperanto ■ articles about Esperanto (from Wikipedia) ■ articles in Esperanto (from Wikipedia) ■ books in Esperanto ■ the “Passport Service” project ■ interesting links ■ specialist literature about Esperanto ■ specialist literature in Esperanto ■ dictionaries

Tiu ĉi DVD estis kreita kun la celo informi pri Esperanto, ebligi al la interesiĝantoj lerni ĝin, kaj prezenti erojn de la Esperanta kulturo. La enhavon de la DVD kunmetis E@I. Nia celo estas ebligi plej eble facilan aliron al tiuj ĉi informoj por plej eble vasta publiko.

This DVD was created to inform about Esperanto, present part of its culture and help others to learn it. The DVD content was compiled by E@I. Our goal is to make this information as easy to access by as many people as possible.



For more information: <http://dvd.ikso.net>

espero

9 788096 953301 ISBN 80-969533-0-3

Minimumaj hardvaraj postuloj por la komputilo: / Minimum computer hardware requirements: 2011

■ DVD-ROM ■ Browser with support for XHTML 1.0 ■

Optimumaj hardvaraj postuloj por la komputilo: / Optimum computer hardware requirements:

■ 500MHz processor ■ 128MB RAM ■ DVD-ROM Operating system: MS Windows XP/Linux (kernel 2.2.14)/Mac OS X 10.2 ■ Browser with support for XHTML 1.0 and CSS 1 (eg. Firefox 1.5, Opera 8.5, Internet Explorer 6.0, ...) ■

Unulingva kovrilo de la disko:

Electronic Esperanto

MULTILINGUAL PUBLICATION

III



The most complete and diverse collection of materials about the international language Esperanto - a language you can learn in around six months!

On this DVD:

music ■ games in Esperanto ■ computer programs in Esperanto ■ a film about Esperanto, concert clips, an Esperanto course on video ■ Esperanto courses - in many languages and at many levels ■ information sheets about Esperanto ■ teaching materials for Esperanto ■ Esperanto event photos ■ magazines in Esperanto ■ articles about Esperanto (from Wikipedia) ■ articles in Esperanto (from Wikipedia) ■ books in Esperanto ■ the "Passport Service" project ■ interesting links ■ specialist literature about Esperanto ■ specialist literature in Esperanto ■ dictionaries



DVD Menu



Music: Paŝa Moĵajev



Games: Battle for Wesnoth

This DVD was created to inform about Esperanto, present part of its culture and help others to learn it. The DVD content was compiled by E@I. Our goal is to make this information as easy to access by as many people as possible.



For more information: <http://dvd.ikso.net>

ISBN 80-969533-0-3

espero

Minimum computer hardware requirements:
■ DVD-ROM ■ Browser with support for XHTML 1.0 ■

2011

Optimum computer hardware requirements:

■ 500MHz processor ■ 128MB RAM ■ DVD-ROM Operating system: MS Windows XP/Linux (kernel 2.2.14)/Mac OS X 10.2
■ Browser with support for XHTML 1.0 and CSS 1 (eg. Firefox 1.5, Opera 8.5, Internet Explorer 6.0, ...) ■